Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

7a jarkolekto n-ro 6
junio 1987

ATENTINDAĴOJ

Venonta estrarkunsido : 12 09 1987 en Antverpeno

------

CSEH-seminarioj (kunlabore kun IEI (Internacia Esperanto-Instituto)

Planita estas kursoserio A, B, kaj C pri la rekt-metoda lingvoinstruado. Unua ŝtupo ( A ) povus okazi en augusto ĉijare en Bruselo. Dua ( B ) tuj antaŭ la venontjara UK en Rotterdam. La tria poste.

Unu el la kondiĉoj estas, ke la kandidatoj havu bonan konon de Esperanto kaj seriozan intereson en ĝia instruado.

Se estas sufiĉa intereso (minimume 10, maksimume 20 partoprenontoj) la serio povos okazi por ne pli ol BF 3000. La preciza kosto dependas de la nombro de partoprenontoj.

Interesitoj sin turnu al S-ro E. VAN DAMME, Albert I straat 44, 1750 SCHEPDAAL, tel 02/569 17 83.

-------

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. • Jarabono: 150 fr. • Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 • Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Jan Bovendeerd, Meidoorn 42, B-2510 Mortsel.

## E S T R A R O

A. Kunordigado : Ivo Durwael ( prezidanto )
P. Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM 03/440 30 92

Jan Bovendeerd (sekretario- oficiale-)
Meidoorn 42/2 2510 MORTSEL 03/449 50 06

Monique Caesstecker (sekretario - praktike-)
Kerkstraat 66, 9940 SLEIDINGE

B. FINANCOJ + ADMINISTRADO
Roland Rotsaert (kasisto)
Visspaanstraat 97, 8000 BRUGGE 050/33 00 04

Alex HUMET (estrarano)
Terliststraat 12, 2018 ANTWERPEN 03/233 97 32

Paul Peeraerts (direktoro)
Baron D'Hanisstraat 13, 2000 ANTWERPEN 03/234 34 00

C. Informado : Edward Symoens
Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT 03/666 62 66

D. Intergrupa agado :
Hilde Vaningelgem-Vandriessche
Arbeidstraat 21, 9300 AALST 053/70 50 11

E. Literaturo - Eldonoj :
Christian Declerck
Amerikalei 153/2, 2000 ANTWERPEN

## K O M I S I I T O J

- Manlibro de la aktivulo : Marc Van den Bempt
  Duisburgsestraat 12, 3030 HEVERLEE 016/20 14 53
- Gazetara Servo : Herman Deceuninck
  Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE 02/360 99 49
- Rebata Servo : Germain Pirlot,
  Kemmelbergstraat 5/3, 8400 OOSTENDE 059/70 87 00
- Propagando + Instruado : Petro De Smedt
  Hemelstraat 44, 9330 DENDERMONDE 052/21 26 77
- Libroservo : Erik D'Hondt
  Wilgstraat 25 A, 9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97



## PROTOKOLO DE LA ESTRARKUNSIDO JE LA 9-A DE MAJO 1987.

Ĉeestis : Monique Caestecker, Ivo Durwael, Alex Humet, Paul Peeraerts, Edward Symoens
Senkulpigis : Jan Bovendeerd

### Antaŭa protokolo

Aprobite.
Chris Declerck devas aperi ĉe la komisiitoj.
Ni petos al Jan Bovendeerd por sendi la leteron al la Ŝtatgazeto kaj sendi kopion de tiu letero al Lucien De Jaeger.
Akcepto ĉe Ministro Coens. Ni ankoraù ne ricevis respondon al nia letero de la 4-a de aprilo.

### Jubilea Komisiono

Unu numero de "Esperanto-Panorama" je la fino de la jaro estu jubilea numero pri la atingoj kaj ni sendu ĝin ankaŭ al la Jubilea Patrona Komitato.

### Manlibro de la gvidantoj

Jan sendos kopion de la statutoj al Marc Vanden Bempt por aperigo en la manlibro.

### Studotago Transakcia Analizo

La studotago de Ivo Durwael je la 23-a de majo ne estas menciita sur la kovrilpaĝo de "Informilo".

### Stato de la membraro

- En la venonta "Informilo" aperos la membrostatistiko.

(Jan, lasu 1/2 paĝon da spaco - Paul aldonos la plej lastajn ciferojn.)

- Pro estiĝo de novaj grupoj kaj por eviti malfacilaĵojn de la pasinteco F.E.L. faros iun proponon pri geografia divido de la lando, tiel ke membroj aùtomate apartenas al difinita grupo kaj ke ne plu ekzistos izoluloj. Paul petos al Jean-Pierre Vanden Daele por fari tion.
Pri tiu divido ni decidos dum la ĝenerala kunsido de la 17-a de oktobro 1988. En tiu ĝenerala kunveno ni ankaù provos harmoniigi la petojn por repagi la kotizojn fare de la grupoj kaj de la Esperanto-centro.

### Laborkalendaro

estrarkunsidoj : 13.VI - 12.IX - 17.XI+ ĝenerala kunsido - 14.XI.

### Unupersona opero

Temas pri oferto de Jo Nell por opero "Leonore Fun Stavoren" en Esperanto.
Bedaùrinde ni ne vidas sufiĉe da intereso flanke de la esperantistoj ĉar ĝi direktiĝas al specialigita publiko.

### Informado

Edward Symoens rakontas ke temas pri propono de Germain Pirlot por iniciati peticion al la Eùropa Komisiono por atentigi la Eùropan Komunumon je la lingva diskriminacio sekve de letero de S-ro Ulburgs kiu estas membro en la komisiono pri petskriboj. Ĉu la energio por petskribo valoras kaj efikas ?
Ni ne vidas praktikan realigeblecon nun kaj ni emas rezigni por la momento. Ni petos konsilon pri strategio al Michael Cwik.

### Financoj

Financoj

Estas samaj.

Kurso Audrey Childs-Mee

Alex Humet timas ke 1.500 frankoj por la kurso estas tro multekosta por senlaboruloj kaj studentoj. Ni tamen konstatas ke Fleja-anoj ne montris intereson en Loveno kiam la kurso estis anoncita. La neĉeesto de granda kvanto da interesuloj havas aliajn kaŭzojn. Oni decidis doni al Audrey Childs-Mee 6.000 fr.

Subteno de novaj grupoj

Regularo por starto de nova grupo (Halle - Oostende - Genk) :
- 1.000 frankoj kontante
- 5.000 frankoj kaskredito ĉe F.E.L.
- 50 ekz. leterpapero kun kovertoj.

Kunlaboro kun F.E.N. (Nederlando)

Da afiŝoj kun la slogano "Esperanto taal in beweging" kun grafikaĵo kaj "Esperanto laat je vér leiden" sube sur la afiŝo. Supre multe da blanka spaco por ekz. anonci kurson.
Paul Peeraerts sendos la du projektojn - eble skize - jam al Nederlando por ilia kunveno je la 2[illegible]-a de majo.

Bildrakonto

Ni ricevis proponon de S-ino Tilleux por ke F.E.L. eldonu bildrakonton pri la vivo de Zamenhof, farita de profesia desegnisto. Paul Peeraerts respondos al ŝi ke tio preterirus niajn eblecojn. Ni sugestos ke ŝi eble kontaktu H.E.A. (Hungario) kiu jam eldonis ekz. La aventuroj de Tom Sawyer en bildstrioj.

Lukontrakto

La nova kontraktpropono kies baza ideo estas ke Institucio Hodler decidus pri la ŝanĝoj sed ke F.E.L. pagu, estas neakceptebla. Aparta kunveno por prepari la planojn de U.E.A. rilate G.C.A. kaj la influo de tiu decido por F.E.L. estas planita je la 17-a de majo je la 9.30-a h. en la centro.

Diversaĵoj

- librovendisto telefonis por sciigi ke li havas grandan stokon de Esperanto-libroj kaj ke li volas revendi al F.E.L. Oni esploros la aferon ĉar oni ne estas certa ke li unue aĉetis ĝin ĉe F.E.L.
- Aŭkcio de malnovaj libroj anoncita en Esperanto-Panorama : malmulte da intereso. Por la estonto ni metos la anoncon en "Monato" por atingi pli grandan publikon.

Fino de la kunsido je la 12.40-a horo.

MC



3

P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 1[illegible]-a de junio 1987 en Antverpeno.

Ĉeestis : Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Alex Humet (AH), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR), Hilde Vaningelgem (HV), Jules Verstraeten (JV) kaj Jan Bovendeerd (JB).

Komenca horo : 08.50 h.
Prezidas : ID
Protokolas : JB kaj MC

1. Protokolo pri la estrarkunsido de 1987 05 09 :
   Pro poŝtaj malfacilaĵoj, la protokolo sendita de MC ne atingis sian destinon.
   MC ĝin voĉlegas.
   Post legado, ĝi estas unuanime aprobita kun la jena kompletigo de PP
   " PP proponas ke estonte la financa parto estu pritraktata unualoke, do, ekde 08.30 h., tiel ke aliaj estraranoj, kiuj ne okupiĝas pri financoj povos veni al la kunsido, ekzemple ĉirkaŭ la 10-a horo. "
   Aprobite.

2. KUNORDIGADO

2.1. La organigramo.
   Pro tro da ŝanĝoj, PP retajpigis la organigramon post kompletigo.
   Ĝi aperos kun la nuna Informilo-numero.

2.2. UK en Varsovio
   S-ro Vansina, membro de la Patrona Komitato pri la Jubilea Jaro, decidis partopreni la UK-on kaj pagis jam la kotizon kaj loĝejon.
   Laŭ la loĝeja servo de UEA, la hotelo, en kiu li mendis lokon, jam estas plena. La problemo nun estas, ke alia loĝeblo ankoraŭ estas, sed pli multekosta.
   Proponite estas, ke ĉar temas fakte pri honora gasto de FEL, la diferenco estu pagota de FEL.
   Post pridiskutado, decidiĝas unueinterkonferenci kun Marc VandenBempt.
   ID kontaktiĝos kun MV.

3. INFORMADO

3.1. MC surtabligas la festprogramon antaŭviditan en decembro. Temas pri la jubilea festprogramo planita kaj proponita al la landaj asocioj de Eŭropo por komune organizi samtage se eble en kunlaboro kun la diversaj TV kaj Radio-stacioj.
   Ĉar ne estis favora reago el eksterlando nek flanke de BRT, la aranĝo

restas la afero de nur FEL. Ja, okaze de la ĝenerala jarkunsido de BEF estis decidite kaj FEL povos disponi pri la mono el la fonduso "Kluho 100" (± 40.000 BF.)

ID proponas meti la aferon en la tagordon de de septembra estrarkunsido, en kiu pritraktiĝu la diferencaj punktoj : Kie ? Kio ? Kiu kion ? ktp.
Pri la ejo - eventuala luo de salonego - ID jam okupiĝos nun.

3.2. ID proponas sendi leteron al la ĉefredaktoroj de diversaj gazetoj en kiu li dankas pro la jam aperintaj artikoloj sed ankaŭ atentigas ilin pri la UK en Varsovio en kiu speciale estas atentigota la dato de la aperigo de la unua libro de D-ro Zamenhof (26 07 1987)
Rektaj bildoj alvenos el Pollando.
Li same avertos ilin, ke dum la semajno de la kongreso, la gvidaj personoj de FEL troviĝos en Pollando. Do, se ili volas pliajn detalojn, ili prefere kontaktu ilin antaŭ la 15-a de julio.
Li samokaze atentigos pri la jubilea kariljonkoncerto en Antverpeno fare de Jo Haazen je lundo 29-a de junio ekde 21.00 h.

3.3. Eŭropa manifestacio. (25 - 30 06 1987)
AH ĉestis kunsidon nome de TEJO, je kies nome la Esperanto Junularo partoprenos la manifestacion.
Li alvokas al helpo ĉe la Esperanto stando.

3.4. Jubilea Kariljonkoncerto : 29 06 87
AH kontaktiĝos kun la respondeculo por ekscii ĉu ni povos aldoni informojn al la programbroŝuro.
Aliflanke decidiĝas disdoni flugfolion.

3.5. Intergrupa agado
NGGE (Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto) proponas k. petas kunlaboron en la eldono de kurslibroprojekto kaj dosiero kun donitaĵoj pri spertoj de kurgvidantoj.
Demandaro estos disendota al la geinstruistoj de Esperantokursoj kun la peto sendi la plenigitajn dokumentojn al :

Gerard GERRITSE
Meijhorst 17-55
NL-6537 NIJMEGEN.

4. <u>LUKONTRAKTO</u> k n Institucio Hodler (raportas Jules Verstraeten)

IH kunvenis antaŭ du semajnoj kaj venis al jena konkludo :



La luantoj (FEL LVS kaj GCA) akceptu la novan luprezon sed ricevos de Instituto Hodler subvencion kiu sumas je la diferenco.

En la sekvanta diskuto evidentiĝas, ke la luprezo jes estos kuplita al la indekso de la detal-prezoj, sed ne la subvencio. Tiel la solvo estas ideala nur unu jaron.
Tamen, ĉar temas pri kontrakto tri-jara kaj por eviti tempo- kaj energiperdon, decidiĝas akcepti ĝin tia.

Ni nun atendos la tekston proponotan de Institucio Hodler.

5. <u>ĜENERALAĴOJ</u>

5.1. RR ensendis jenajn proponojn:

5.1.1. Ĉu ne havigi al GCA modernan komunikilon por siaj kontaktoj ekz. kun MONATO (kiu ja estas presita de GCA), UEA k.a.
Temas pri TELEFAX.
La investo estas tre alta, kvankam la propono estas tre inda.
Eventuala kunlaboro kun najbaraj firmaoj estus interesa, sed laŭ la jamaj spertoj neverŝajna.

Afero pripensenda kaj repriparolenda.

5.1.2. PIV - Irana
Laŭ informoj ricevitaj, iu Iranano kopiis la PIV kaj klopodas ĝin vendi ankaŭ ekster Irano. Tio estas nelojala konkurenco.
Ĉu ni reagu?
Reago ne estus la necesa solvo, kvankam ni jes atentu pri tio kaj ne aĉetu ĝin. Certe ne konsili al aliaj ĝin aĉeti.

6. <u>FINANCOJ</u>
La ĝenarala stato estas kontentiga.

Fina horo : 12.30 h.

JB/MC

---------------

La interhomaj rilatoj en FEL XV (Ivo Durwael)

## NIA CELGRUPO

Ĉiuj gravaj memoraĵoj el nia infanaĝo estas neforviŝeble registritaj en nia cerbo. Per sciencaj eksperimentoj oni sukcesis nerefuteble pruvi tion. Ni nur ne sukcesas revoki ĉion tion en la memoron. Tiu ĉi kapablo eĉ malpliiĝas je maljuniĝo. Sed la registritaj informoj ne malaperas.

Tiu sensacia malkovro klarigas kial la influo de niaj gepatroj estas neforviŝebla. Ni povas konsciiĝi pri tio kaj decidi por ne plu imiti la gepatrojn rilate iujn punktojn, sed la interna voĉo, kiu diras : "Ne malpurigu vin". "Estu obea al via patrino" ktp eterne restas !

Tiu malkovro ankaŭ klarigas kial, ekde naskiĝo, ni apartenas al socia grupo, kiun ni plej ofte ne forlasas. La eventuala ŝanĝo estus malfacila kaj ne sen konfliktoj por la kandidato kaj por la ĉirkaŭaĵo.

Zamenhof estis instruita kaj sobra homo. Nur tiuj ĉi faktoj jam difinis grandparte la mezan socian staton de la Esperantistaro. Mankas en la movado precipe laboristoj, komercistoj kaj socie altrangaj personoj. Laŭ la ekzemplo de la majstro, ni ankoraŭ nun strebas al minimumaj elspezoj por la interesatoj pri Esperanto. De la gvidantoj oni jes atendas konsiderindajn elspezojn. La aranĝojn, la revuojn, la propagandon karakterizas sobreco. La ĉefa kialo eble ne estas manko de mono, sed la komuneco de nia vivstilo.

Mi konas aron da ekzemploj, kie Esperantogrupoj,-asocioj ktp povus elspezi monon por pli luksa reklamo, pli prestiĝa revuo. Sed supoz--eble pro sia eduko, tiuj homoj ne povas permesi al si tian "forjeton" de mono. Ankaŭ la Esperanto-feriejoj estas pli sobraj ol la plimulto de la modernaj feriaj aranĝoj.

Por trarompi tiun tradicion ĉe kelkaj gvidantoj vekiĝis jam la ideo por varbi Esperantistojn per multekostaj, luksaj reklamrimedoj. Kompreneble, la nove varbitaj homoj devos pagi la kampanjon. Kompare al la tradicio, ili do devos elspezi multon por lerni Esperanton. Se tia kampanjo sukcesus, oni varbus publikon kun tute aliaj postuloj kaj deziroj por la ferioj, rekontiĝoj ktp. Restas dubinde, ĉu eblas integri tiun novan publikon en la ekzistantan movadon. Se tio ne eblas tiam la la kampanjo povus efiki kiel sufleo : rapida ŝveliĝo kaj poste subita ŝrumpiĝo. Tial oni opinias, ke esencaj ŝanĝiĝoj por scipovi tuŝi pli vastan publikon okazu iom post iom !

I.D.